

## Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 1-an de julio 2021 per Zoom

### Ĉeestis

Bård Hekland (Bergen), Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim), Vidar Skretting (Oslo), Marianne Lund (Tromsø). Fine de la kunveno venis ankaŭ Lars Sandbakk (Stavanger)

### 1. Tagordo

Oni aprobis la tagordon, sed ĉar ĉeestis (komence) nur kvar estraranoj oni decidis prokrasti kelkajn ampleksajn temojn ĝis venonta kunveno.

### 2. Prezento de la estraranoj

La estraranoj mallonge prezentis sin.

### 3. Protokolo de la pasinta kunveno

La protokolon de la pasinta kunveno (29an de aprilo) estis aprobita de la eksestraro rete la 30an de aprilo.

### 4. Funkciado de la estraro

- a. Oni decidis ĉefe uzi Esperanton, sed ankaŭ la norvegan, laŭ individua prefero.
- b. La estraraj kunvenoj okazu proksimume ĉiun sesan semajnon, ĵaŭde je la 20.00 (vintre eventuale 20.30) per Zoom. Vidar faros dosieron en Dropbox, alireblan de ĉiuj estraranoj, kie ni konservos ĉiujn niajn dokumentojn (ekz. la protokolojn).
- c. Jardar prizorgas la funkciadon de la estrara retlisto.
- d. Bård dissendos tagordojn. Marianne faros protokolojn kaj dividos ilin kun la ceteraj estraranoj en Dropbox, post kio la ceteraj estraranoj donas siajn ŝanĝproponojn. Se post semajno venis neniu ŝanĝpropono aŭ diskuto, ĝi estu konsiderata aprobita, post kio Jardar publikigas ĝin en la retpaĝo. En kazoj de diskuto oni aprobas ĝin en la posta kunveno.
- e. Marianne okupiĝos pri la necesaj ŝanĝoj en Brønnoysundregisteret. Aliron al bankkontoj de NEL (en DNB) daŭre havu Claude Rouget (kasisto), Douglas Draper (deĵoranto) kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (vicprezidanto).

### 5. Skiza laborplano por 2021-22

Ni decidis prokrasti la punkton ĝis la autuno kaj diskuti ĝin en seminarieca estrarkunveno kun pli kompleta partopreno, minimume kvin aŭ ses estraranoj.

Fine de la kunveno ni neformale iom interparolis pri NJE, skandinavia kunlaboro kaj membromastrumado. Tiujn temojn ni pli profunde pritraktos en la venonta kunveno.

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaudon la 12-an de aŭgusto je 20.00 per Zoom.

Protokolis Marianne Lund